
IF EF

№ 04
1972

G.L. GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti



IFEA

## BONDEZIROJ

Okaze de la venontaj festoj, la estraro de Itala Fervojista Esperanto-Asocio "I.F.E.A." kaj la redakcio de "Itala Fervojisto", varme bondeziras feliĉan Kristnaskon kaj prosperan Novjaron al ĉiuj membroj kaj simpatiantoj de nia Asocio; korajn bondezirojn ankaŭ al la estraro de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio "I.F.E.F." kaj al la tuta anaro kaj legantaro en ĉiuj Landoj.

oooooooooooooooooooooooo

## COMUNICATO DEL CASSIERE

Le quote sociali per l'anno 1973 sono rimaste le seguenti:

- Associazione all'I.F.E.A., I.F.E.F., F.E.I. ed U.E.A. con abbonamento alla rivista mensile "L'ESPERANTO-FEI": L. 3'500,- annue (L. 2'500,- per i giovani fino a 21 anni e per i familiari).
- Associazione solamente all'I.F.E.A. ed I.F.E.F. (per quei soci che pagano le quote di associazione alla FEI ed UEA direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): L. 1'000,- annue.

Si pregano vivamente iSoci che non hanno pagato le quote sociali per l'anno 1972 e continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote 1972 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti, oppure trasmettere le loro dimissioni per non pagare, anche per il 1973, le loro quote alle suddette Associazioni. ADERITE ALL'I.F.E.A.! SOSTENETE LA NOSTRA ASSOCIAZIONE! VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE 1973!

Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega il bollettino del C.C.P. n° 8/24094 intestato all'IFEA, Via Donato Creti, 61 BOLOGNA-40128

oooooooooooooooooo

## FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO = 25 JARA JUBILEO = I.F.E.F.

1948 - 1973 = AARHUS (Danlando) 12 - 18 Majo 1973.

### PROVIZORA PROGRAMO

Vendrede 11/5: Gazetara konferenco. Kunveno IFEF-estrarp - L.K.K.
Sabate 12/5: Interkona vespero.
Dimanĉe 13/5: Ekumena Diservo. Solena malfermo. Komuna fotografado. Kongresa bankedo. Urba rondveturado. Kongresa balo.
Lunde 14/5: Komitata kunsido, nepublika. Komitata kunsido, publika. Duontaga ekskurso.
Marde 15/5: Komisionaj kunsidoj. Vizito. Urba akcepto.
Merkrede 16/5: Tuttaga ekskurso.
Jaŭde 17/5: Plenkunsido. Vizito. Fakprelego kun filmo. Junulara kunsido. Junulara vespero.
Vendrede 18/5: Informado pri la 26-a. Ŝak- kaj bridĝturniro. Piedpilko. F.I.S.A.I.C.-vespero.

### PRAKTIKAJ INFORMOJ

Kongreskotizo: ĝis 31/1 1973: 76,- danaj kronoj post 1/2 1973: 96,- d.k.
familianoj, pensiuloj, gejunuloj ĝis 20 jaroj: la duono
simpatiantoj (kiuj ne ĉeestos la kongreson): minimume 20,- danaj kronoj.
Hotelprezoj: 30,- ĝis 100,- kronoj po lito. Manĝoj: inter 8,- kaj 30,- kronoj. Ciuj prezoj inkluzivas imposton kaj servmonon
La kongresejo estas atingebla per dekminuta aŭtobus-veturado de la ĉefstacidomo. Konstanta kongresa adreso: 25-a IFEF-kongreso, Assensgade 18 DK - 8000 Aarhus C (Danlando).

La loka kongresa komitato jam longe laboris por aranĝi VIAN ĉeeston kiel eble plej agrablan. L.K.K. ĝojas VIN vidi en Aarhus, kaj ni kore bonvenigas Vin ĈIUJN al

LA JUBILEA KONGRESO DE I.F.E.F.!

La Danaj gekolegoj atendas Vin en Århus kaj en Kopenhago por la: 25-jara JUBILEO DE I.F.E.F. kaj ĝia Postkongreso!

## POSTKONGRESO DE LA 25-a KONGRESO DE IFEF = KOPENHAGO 19-21 MAJO 1973

PROVIZORA PROGRAMO
Adreso: POSTKONGRESO DE KOPENHAGO 1973, poŝtbox 952, DK 2400 KOPENHAGO NV.
Hotelo: SCT. LAWRENCE (fluanta ŝipo), Kalvebod Brygge.
Hotelprezoj: Unulita ĉambro 70,- ĝis 90,- danaj kronoj po tagnokto
Dulita ĉambro 105,- " 130,- " " " "

En la prezoj estas kalkulita matenmanĝo, servmono kaj imposta tarifo. Forvojaĝo el Århuso la 19-an de majo, matene je la 8,10-a h. per ŝipo al Kalundborg. De tie la kongresanoj per trajno atingos Kopenhagon tagmeze ĉa je la 12,40-a h. Dum la vojaĝo al Kopenhago la kopenhagaj esperantistoj gvi dos vin. Ĉe la alveno en la Kopenhaga ĉefstacidomo la esperantistoj tie bon venigos vin kaj diversmaniere helpos vin. Ili gvidos vin al la fluanta hotelo, kiu tre praktike situas en la proksimeco de la Ĉefstacidomo, Tivoli kaj la urba centro. Nia klubejo (Otto Busses Vej 3), kiu ankaŭ situas proksime al la Ĉefstacidomo, estos malfermita dum la tuta restado de la kongresanoj. Havebla tie estos kafo, teo, kukoj kaj diversaj trinkaĵoj je moderaj prezoj. La festo okazos sabate je la 17-a h. Ĝi okazos en la nova Ŝarĝtrafika Stacidomo. Programo: Bonvenigo - Manĝado - Festparolado - Kantoj - Amuzaĵoj kun surprizoj - Dancado - Fino.
Prezoj: 15,- d.kr. (La prezo inkludas manĝaĵon sen trinkaĵoj). Trinkaĵoj estos aĉeteblaj je modera prezo.
Ekskursoj okazos dimanĉe: A) Urba ekskurso (25 d.kr.) per aŭtobuso kaj ŝipo. B) Urba ekskurso piede kaj per oficialaj aŭtobusoj. (ambaŭ 3 horojn).
La amuzan parkon Tivoli ni vizitos dimanĉe vespere.
Lunde: LIBERA TAGO.

La Postkongresa Komitato

## HUNGARA KULTUR - FESTIVALO

Multaj Eŭropaj Esperantistoj, kiuj ne havis la eblecon transiri la Atlantikan Oceanon kaj la Amerikan Kontinenton por ĉeesti la 57-an U.K. en Portlando (Usono), partoprenis la Hungaran Kultur-Festivalon en Budapeŝto.

Tiu mirinda kaj altnivela manifestacio disvolviĝis de la 17-a ĝis la 23-a de julio kaj montris, ankoraŭ foje, la kapablecon de la Hungaraj geamikoj aranĝi internaciajn renkontiĝojn, ĉu je organiza ĉu je kultura vidpunktoj.

Samtempe kun la Festivalo, disvolviĝis la Kunordiga Konferenco de ILEI por eksperimenta instruado de Esperanto en kelkaj klasoj de la elementaj lernejoj en kvin Eŭropaj landoj (Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio). Ankaŭ tiu Konferenco estis bone vizitata kaj la gepartoprenantoj streĉe laboris dum pluraj tagoj sub la instigoj de la ĝenerala sekretario de ILEI D-ro Mario Dazzini el Massa kaj de lia fratino Prof-ino Catina, Itala estrino de ILEI. Partoprenis la Konferencon ankaŭ Prof-ro Sonnabend, Vicprezidanto de ILEI, kiu, kun ĉiuj pedagogoj laboris dum la tuta Festivalo en la instruista kampo.

Jam lunde, la 17-an de julio, la solena inaŭguro de la H.K.F. kaj la interkona vespero, dum perŝipa promenado sur la Danubo, substrekis la internacian karakteron de la Festivalo, plue akcentita marde, de la kunveno de la Mondpaca Esperanta Movado gvidata de S-ano Aleksiev el Bulgario, ties Prezidanto. La Festivalo disvolvis interesan programon: la inaŭguron de altnivela ekspozicio de kelkaj verkoj de Esperantistaj pentristoj, grafikistoj kaj skulptistoj; teatraĵojn; prezentadon de la Budapeŝta Simfonia Orkestro de Hungaraj Ŝtatfervojoj; lumbild- film- kaj pupteatra-prezentadojn; kantojn kaj ĥorojn. Sed la pinto de la Kultura Festivalo fariĝis la literatura programo kun la prezentado de "Perloj de Hungara literaturo", "Originalaj Hungaraj E-Verkistoj" kaj "Nuntempa Hungara Literaturo en "HUNGARA VIVO". Ĉeestis, la famaj Esperanto-verkistoj: Kàlmàn KALOCSAY, Sàndos SZATHMARI kaj Lajos TARKONY.

La densa programo enhavis ankaŭ Folkloran kaj Muzikan vesperojn; en tiu ĉi lasta, ludis la mondfama fortepian-artisto Imre UNGÅR, gajninto de multaj premioj.

La organizintoj de la Festivalo donis al ni la eblecon viziti la multnombrajn Muzeojn, Galeriojn kaj Monumentojn de la bela Ĉefurbo, kaj disponigis tre lertajn kaj kapablajn gvidantojn.

La Festivalo memorigis ankaŭ nian karan amikon kaj faman poeton Julio BAGHY, per inaŭguro de Memortabulo sur lia loĝdomo.

Pluraj ekskursoj konigis al la partoprenintoj la plej famajn ĉirkaŭaĵojn de Budapeŝto: ni elektis la autobus-ekskurson al Esztergom kaj Visegrad tra la montaro Pilis. Eksterordinaraj, la afableco kaj kompetenteco de D-ro Jòzsef MÁTÉFFY, Prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio. Lasta ŝipa promenado sur la Danubo konkludis la Festivalon; poste nur la adiaŭoj al Hungaraj kaj eksterlandaj geamikoj.

Vojaĝante per aŭtomobilo ni profitis la okazon viziti, laŭlonge de la vojo, niajn geamikojn ĉe Lago Balatono, Zagrebo, Postojna, Trieste kaj cetere.

G.Gimelli

## FERVOJISTOJ-ESPERANTISTOJ EN CLERVAUX (LUKSEMBURGIO)

Belgaj, francaj kaj germanaj kolegoj organizis komunan jarkunvenon en Clervaux (Luksemburgio), de la 6-a ĝis la 9-a de oktobro 1972-a.

La afabla invito de ni ricevita multe plezurigis nin, precipe ĉar, okaze de la jarkunveno, oni starigis en Luksemburgio novan landan sekcion de I.F.E.F.. Neniu, vere, estus povinta supozi, ke la renkontiĝo fariĝos tiel vizitata kaj plurnacia; fakte, la origina "trilanda" renkontiĝo estis en realo preskaŭ Internacia IFEF-kongreso, pro partopreno de 285 personoj el 12 landoj. La kutima etoso estis aparte vigla pro la mirindaj pejzaĝoj de la regiono, kaj pro la bonega aranĝo de la jarkunveno flanke de niaj kolegoj de la tri organizintaj landoj.

La interkona vespero okazis vendredon la 6-an de oktobro en la "Hotelo de la Abatejo". La postan tagon okazis la solena inaŭguro, kun ĉeesto de la Prezidanto de FISAIC (Internacia Federacio pri sociaj kaj kulturaj aktivecoj de la fervojistoj), D-ro Schlessner, kaj de la Vicprezidantoj, S-ro Phain el Francio kaj S-ro Gilles el Belgio. Ankaŭ ĉeestis pluraj lokaj kaj fervojaj aŭtoritatuloj, inter kiuj la simpatia staciestro de Clervaux.

La Urbestro bonvenigis la gastojn, kaj pruvis sian simpation al la esperanto-aranĝo akceptante, dimanĉe, la partoprenantojn, kiujn li ankaŭ abunde regalis per bongusta loka vino. La Prezidanto de IFEF, S-ro Giessner, estris la tutan inaŭguron, kaj dum la arta vespero prezentis la diversajn erojn de la interesa programo. Estas aparte menciindaj la belga fervojista virĥoro, la luksemburga soprano S-ino Kohl, la germana baritono S-ro Lange, kvarpersona franca trupo kiu ludis esperantlingvan komedion. La diversaj programeroj estis kunligitaj de la orkestro de la luksemburgaj fervojoj. La tekstoj, vere interesaj kaj altnivelaj, estis tradukitaj de S-ro Giessner.

Nekutima, sed vere kortuŝa, estis la ekumena Diservo, kuncelebrata de tri diverslandaj katolikaj pastroj kun homilio de protestanta pastoro. Tuj poste, en la ĉeesto de la urbaj aŭtoritatuloj, la kongresanoj deponis florkronon ĉe la monumento honore al la dummilitaj mortintoj de Clervaux.

Sed dimanĉo ne estis nur tago de oficialaj eventoj, ĝi ankaŭ estis tago de ekskurso al la regiono de Vianden kaj de Echternach. En la unua loko impresis nin la malnova kastelo, kvazaŭ aglo-nesto, kuŝanta sur roko meze de la vilaĝo, kaj la modernega akvobaraĵo; sed ankaŭ la manĝo estis memorinda! En la alia loko, ni admiris la abatejon, la malnovan urbodomon, kaj neantaŭviditan, solenan ceremonion: ĝuste en tiu tago, ja, la abato eniris unuafoje en sian abatejon. Ĉirkaŭe, ĉie, ĉiam, senlimaj arbaroj, riveroj, verdaj ebenaĵoj kun kuŝantaj bovinoj.

Lundon, ni vizitis la urbon Luksemburgon; la organizantoj estis aranĝintaj aŭtobusan viziton de la eŭropaj konstruaĵoj kaj de la konataj kazematoj. Post bongusta tagmanĝo, la adiaŭoj. Ni restis en la urbo ĝis nokto, kaj profitis la okazon por detale viziti la lokajn belaĵojn, kiujn ni estis povintaj vidi nur supraĵe dum la matena vizito.

G.Gimelli

## 43-a ITALA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO

PISA de la 16-a ĝis la 23-a de septembro 1972-a

La 43-a Kongreso de la Italaj esperantistoj, kvankam nur lastmomente fiksita en Pisa (pro tio kun malmulte da tempo por la organizaj laboroj), havis grandegan sukceson. Plue ĝi vekis grandan intereson en la urbo kaj en la Toskana regiono, kiel atestas la plurkolonaj titoloj de la taga gazetaro: "Kompreni unu la alian esperante", "Esperanto estas la solvo de la lingva kaoso", "Uzo de tiu lingvo por la progreso de la popoloj en la edukado, en la scienco kaj en la Kulturo", kaj cetere. La brilajn rezultojn de la kongreso ni ŝuldas al Prezidanto de L.K.K. Geom.G.Martini kaj al liaj gefamilianoj, precipe al senlaca edzino Rosa, kaj al nemultaj helpantoj, kiuj, jam sabate, akceptis afable kaj zorgeme ĉe la stacidomo, la alvenantojn.

Sabate tagmeze la urbestro de Pisa donis verdan standardon al la Pisa Esperanto-Grupo. La interkonatiĝa vespero ĉe Hotelo Terminus varmigis la etoson; samtempe okazis renkontiĝo de la Konsilio de F.E.I. kaj L.K.K. kiu daŭris ĝis la dua matene.

La Sankta Meso celebrita en la impona preĝejo "Chiesa Nazionale dei Cavalieri", havis specialan solenon en la grandega preĝejo, kie pendis la standardoj de la turkaj "galeroj" venkitaj de la Kristanoj en Lepanto. Je la fino, la pastro benis la novan flagon de la E-Grupo de Pisa. Poste komuna fotografado kunigis la kongresanojn sur la ŝtuparo de la mirinda palaco de "Cavalieri" aŭ de la "Carovana".

La solena inaŭguro de la kongreso okazis en la "Aula Magna" de la Universitato. Ĉe la Prezida tablo la reprezentanto de la Universitato, la urbestro, la prezidanto de FEI kaj la prezidanto de LKK; post la bonvenigaj vortoj de la prezidantoj Martini kaj Azzi, kiuj salutis kaj dankis aŭtoritatojn kaj instancojn, parolis Prof-ro Mancini, en la nomo de la Universitato, kaj la Urbestro Prof-ro Lazzari. Antaŭ la festparolado de Prof-ro Mario Dazzini, bondeziris la kongreson la reprezentantoj de la naŭ partoprenintaj landoj (Aŭstrio, Britujo, Bulgario, Francio, Germanio, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Svislando) kaj de la diversaj fakasocioj. Inter la eksterlandaj reprezentantoj, kolegoj Chapellier, Kapitany kaj Greutert. La salono estis plenplena. Inter la multnombraj aŭtoritatuloj ĉeestis ankaŭ Hon.Deputito Enzo Meucci, unu el la proponintoj de la leĝo n-ro 342 por la enkonduko de Esperanto ankaŭ en la Italajn lernejojn. Li simpatie alparolis la kongresanojn ankaŭ kiel ano de la urbo Pisa kaj bonvenigis nin en ĝia nomo. Vespere, en la koncert-salono de Teatro Verdi la trupo "Amikoj de Teatro" sub aŭspicioj de E.N.A.L. plezurigis la kongresanojn per siaj altnivelaj prezentadoj.

Lunde fariĝis la Poŝta tago ĉar estis inaŭgurata ekspozicio de esperantaj poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj kaj la speciala poŝta oficejo, starigita en la Kongresejo, uzis specialan porokazan poŝtstampon.

En la salono de "Dopolavoro Ferroviario" kun la ĉeesto de kelkaj eksterlandaj reprezentantoj, okazis la Jarkunveno de la Itala Fervojista Esperanto-Asocio. Samtempe aliaj fakasocioj kaj la starigitaj studrondoj, kunvenis kaj debatis longe kaj arde. Posttagmeze la kongresanoj kolektiĝis en la kongresejo kaj sekvis la flagon de la Grupo kaj memorkronon, ĝis la nova strato titolita al "D-ro L.L. Zamenhof". La longa sekvantaro vekis grandan intereson ĉe la loĝantaro. La nova strato estis inaŭgurata de la skabeno pri Toponimio en la ĉeesto de Pola delegacio. La premiado de la venkintoj de la internacia literatura konkurso okazis lunde vespere. Por la poezio gajnis la 1-an ormedalan premion: Gianluigi Gimelli (Italio) per la poezio "MI MEM", la 2-an (arĝentmedalon): Kiell Walraamoen (Norvegio) per "FLOROJ APUD ABISMO", la 3-ajn du premiojn gajnis samrajte: Julius Babin (Usono) kaj Adriana Ravoni (Italio). Pri la prozo ne estis aljuĝita la 1-a premio. Gajnis la 2-an premion Nevena Nedelceva (Bulgario) per la novelo "KIO ESTAS LUMO", la 3-an, Penca Ruseva Batoeva (Bulgario) per la novelo "UNUA KORTREMO" kaj estis asignita la honora mencio, al "DANCADO SUR LA PLACO" de Lina Gabrielli (Italio). Dum la vespero oni legis la premiitajn konkursaĵojn kaj fine oni

prezentis la lastan Esperanto-filmon de F.I.A.T. "Cascadeur".

Marde la studrondoj streĉe laboris, dum posttagmeze okazis la publika konferenco-debato, enkondukita de Prof-ro Carlo Minnaja. Vespere la oficiala balo en la bruega salono de la nokta klubo "Papiro", feliĉigis nelacigeblajn gejunulojn kaj plenkreskulojn kaj eĉ kelkajn maljunulojn.

Merkrede, dum la organizita vizito de la urbo, per simpatia iniciato, oni liberigis pli ol 300 balonetojn al kiuj estis ligita karto kun paca mesaĝo, kaj enketo kun demandoj al kiuj devus respondi la trovintoj de la balonetoj. Jam la postan tagon tri el tiuj demandiloj revenis al la kongreso plenigitaj. Vespere, vokala koncerto de la 40-kantistoj de la ĥoro de Pisa sub aŭspicioj de E.N.A.L. en la salono de Teatro Verdi.

Ĵaŭde, oficiala fermo de la kongreso post la prezentado de la raportoj de la studrondoj, kaj aprobo de la finaj rezolucioj dum ĝenerala asembleo. Vespere alia koncerto en la sama salono de Teatro Verdi, kun gitar-virtuoso Majstro Vittorio Sassetti kaj Komplekso de leĝera muziko.

La esperantaj gejunuloj efektivigis interesan eksperimenton de enketo per tri demandoj al la neesperantistaj enloĝantoj de Pisa kaj Viareggio: ĝi havis grandan sukceson kaj vekis la intereson de ĉiuj medioj.

Per la mirindaj ekskursoj, al Toskana arkipelago, vendrede, la 22-an de oktobro, per aŭtobuso kaj ŝipo, kaj al Vinci, Certaldo kaj San Giminiano, sabaton la 23-an, finis nia 43-a Jara Renkontiĝo; tamen tiu ĉi lasta ekskurso havis specialan simpatian voston: reveninte al Pisa, la aŭtobusoj haltis en "Terricciola" kie disvolviĝis la vin- kaj vinber-Festo. La Urbestro mem akceptis kaj kondukis nin ĉe la vin-muzeo kaj keloj por ke ni gustumu la lokajn bonegajn vinojn, kaj ĉe la lernejo, kie estis aranĝitaj Artaj kaj Filatela ekspozicioj.

G.GIMELLI

## LASTAJ ESPERANTAJ RENKONTIĜOJ

BOLOGNA - Dimanĉon la 22-an de oktobro -

Por digne konkludi la solenaĵojn pri la 60-a datreveno de nia grupfondiĝo kaj malfermi la jaran aktivecon, oni decidis organizi en Bologna novan esperantan manifestacion riĉa el variaj programeroj kiuj bonsukcesis.

Dimanĉon matene, la 22-an de oktobro, sub brila suno kaj belega vetero, oni malfermis la manifestacion en la salono de kvartalo Malpighi, afable disponigita de la Komunuma aŭtoritato. Multnombraj ĉeestantoj (esperantistoj aŭ ne) atentis kun intereso la du klerajn prelegojn de la jam konataj oratoroj Prof-ro Agostini kaj D-ro Tadolini, ambaŭ iamaj prezidantoj de la grupo Achille Tellini. La temoj majstre pritraktataj, estas ĉiam aktualaj:

- Ĉu Esperanto fariĝos Eŭropa lingvo? - Enkonduko de E-o en la lernejojn

D-ro Tadolini en sia bone dokumentita ekspozicio klare analizis la kialojn pri kiuj Esperanto povas helpi la elekton de komuna lingvo por Eŭropo: ĝia facileco, ĝia klareco kaj precipe ĝia neŭtraleco donas al tiu idiomo la serĉatan karakteron de internacieco; dume nek morta nek vivanta lingvo povas ludi la rolon de komuna internacia lingvo.

Prof-ro Agostini, poste, en klera leciono prezentis la paralelon inter latina lingvo kaj Esperanto, montrante la gravecon de ambaŭ. Esperanto estas filo de latino pro tio egale inda penetri en la lernejojn.

Multnombre alkuris la samideanoj el la najbaraj urboj igante pli riĉa kaj pli agrabla la manifestacion: Milano, Verona, Massa, Pistoia, Rimini, Santarcangelo, Cesena, Parma kaj Modena sendis al ni reprezentantojn, kaj ni, dankemaj, promesis al ili nian partoprenon dum la esperantaj kunvenoj kiuj, dum la aŭtuna sezono sinsekvas seninterrompe por solenigi la malfermon de la lernojaro. Interalie, okazis, dum la manifestacio, per mano de prof-ino Sabelli (direktorino de la bolonja katedro de Esperanto) la disdono de la diplomoj al novbakitaj esperantistoj kiuj subtenis regulan ekzamenon pri 1-a kaj 2-a grado de Esperanto dum la pasinta junio.

Simpatie kaj gaje oni konkludis la matenajn manifestaciojn antaŭ manĝotablo, riĉe ornamita per floroj kaj spicita per bongustaj manĝaĵoj el la plej

famaj specimenoj de la bolonja kuirarto. Posttagmeze oni kondukis la gastojn al vizito de la urbo kaj precipe de la ĉefaj preĝejoj kiuj enhavas grandparte de la bolonjaj artaĵoj.

CESENA - Debato pri "Esperanto en la lernejo kaj en la Societo" - Dimanĉon la 29-an de oktobro.

La postan dimanĉon, sekvis du similaj manifestacioj en Cesena kaj Verona, kun disdono de la diplomoj, debat-konferenco kaj aliaj agrablaĵoj al kiuj la bolonjaj samideanoj partoprenis, ĉu al la unua, ĉu al la dua kunveno.

En Cesena, post la katolika diservo en la preĝejo "Suffragio" (kie Pastro Ciccanti kaj Pastro Bruno Benini kuncelebris la Sanktan Meson), la kunvenintoj plenigis la grandan salonon de la "Palazzo del Ridotto". Tie je la deka horo, oni malfermis la manifestacion antaŭ lernejaj aŭtoritatoj kaj juna publiko (studentoj, gepatroj kaj lernejestroj) kiuj partoprenis aktive la debaton pri: "Esperanto en la lernejo kaj societo". Prezidis kaj honoris la kunvenon la Vicurbestro, Prof-ro Agostini, Prof-ro Pagliarani kaj inda gasto vere aplaŭdata estis Prof-ro Mariani, lernejestro, kiu donis al nia Movado mirindan helpon kaj imitindan ekzemplon. Al li oni ŝuldas la feliĉan iniciaton enkonduki la instruon de Esperanto en Lian elementan lernejon "Oltre-Savio" por la tria, kvara kaj kvina klasoj, por helpi la studentojn de fremdaj lingvoj dum la superaj lernojaroj: li vere komprenis la valoron kaj la helpon de Esperanto kiel propedeŭtika lingvo. Aliĝis al tiu kurso la tuta lernantaro (330 geknaboj) kun apogo kaj kunsento de ĉiuj gepatroj.

Kun la kutimaj kapabloj kaj sperto parolis Prof-ro Agostini donante precipan reliefon al "interna ideo" pri kiu Zamenhof donis al sia kreitaĵo spiritan valoron kaj al ĉiuj esperantistoj la karakteron de veraj apostoloj inter la homaro por konduki en la mondo, fratecon kaj pacon. Tiun koncepton li volis reliefigi precipe por respondi al iu demandanto, kiu opinias ke la esperantistoj havas tro da optimismo, eĉ fanatismo, ĉar, li diras, nek Esperanto, nek "Interna Ideo" povos sukcesi forpeli perforton kaj militon.

Ankaŭ Pastro Ciccanti respondis efike al kelkaj demandoj dum tiu debato kaj se li ne sukcesis konvinki, almenaŭ montris la bonan intencon de la esperantistoj. Kiel kutime en ĉiuj gajaj manifestacioj, ankaŭ ĉifoje fermis la solenaĵon bruema, komuna tagmanĝo, en la jam konata restoracio "Da Gianni"

Giuseppina GAMBERINI

## N I L E G I S

B A H A'I: La Mondkredo por la Nuntempa Homaro. Arthur L.Dahl. Tradukis: S-ino Roan Orloff Stone, 504 North Fifth Street Gallup, New Mexico 87301, Usono. (havebla senpage). La traduko utilas por informi mondskale pri tiu ĉi mondkredo; temas pri filozofio pli ol pri religio, fakte ĝi skizas spiritan vivmanieron. La publikaĵo prezentas kompletan bildon pri la penso de sekvantoj de perso Bàb kaj liajn instruojn ĉu religiaj ĉu politikaj kaj sociaj.

La broŝuro sin prezentas bone, ĝi estas leginda kaj precipe la scivolaj gejunuloj favore ĝin legos, ĉar plaĉas al ili la administra sistemo de organizitaj grupoj kaj la laikaj ceremonioj, la internacia socio. Bahaanoj estas mondcivitanoj, kiuj serĉas spiritajn verojn, konvinkitaj ke nur sub gvidado de Supera inspiro (=Dio) la homo povas evoluiĝi kaj spirite pliboniĝi.

Catina DAZZINI

KIU ESTAS PATRO PIO?- Alberto del Fante. Tradukis Frato Arni Decorte F.C. Eldonita de la Fratoj de la Karitato S-kta Kamilo Inst. BIERBEEK (Belgio).

Kun vera plezuro mi akceptis la taskon recenzi tiun ĉi moralan verkon pri la itala famkonata: Patro Pio da Pietralcina, inda filo de S.ta Francisko.

La celo de tiu ĉi verko estas diskonigi pli bone la personecon de la tre humila Kapuceno, samkiel la konvertojn, la resaniĝojn kaj la sennombrajn gracojn kiujn Dio sendas al ni per Lia propeto ĉe la Ĉielo. La malgranda broŝuro, ilustrita per multnombraj fotoj, havas jam legantojn en ĉiuj mondpartoj, danke al esperanta traduko, fare de esperantista religiulo: Frato Arni, kun la afabla permeso de la aŭtoro mem. Ĉi tiu broŝuro estas aĉetebla ĉe la "Casa Sollievo della Sofferenza" la belega hospitalo kiun Patro Pio konstruigis sur la Monto Gargano por helpi la malfeliĉulojn.

Giuseppina GAMBERINI